

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Joachim Gießner*

1. La luno jam leviĝis,  
steletoj ekheliĝis,  
ravante homojn nin.  
Silentas la arbaro  
kaj super la kamparo  
nebulo pala levas sin.

2. Neniu vento blovas,  
la mond' ne plu sin movas  
sub paca, klara lun'.  
Nun petu noktan benon,  
de l'tago la ĉagrenon  
dormantaj vi forgesu nun.

3. Jen luno sur ĉielo  
en brila ronda belo  
duon-videbla nur.<sup>4</sup>  
Ĉar multon ni ne vidas,  
ni ofte ĝin priridas,  
malsaĝe juĝas kun plezur'.

4. ....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....

5. ....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. La luno nun leviĝis,  
La steloj eklumiĝis,  
Subiĝis jam la sun'.  
Silentas la arbaro  
Kaj super la kamparo  
Nebulo blanka kuŝas nun.

2. La mondo ŝajnas kiel  
Hejmeca ĉambro, tiel  
Trankvila estas ĝi.  
Dormante ĉiun penon,  
Aflikton kaj ĉagrenon  
Dum nokta hor' forgesu vi.<sup>3</sup>

3.) Jen staras ĉe l' ĉielo  
Tre eta fora stelo,  
Sed tamen egas ĝi!  
Ja estas ofte aĵo  
Por ni nur ridindaĵo;  
Ĉar ne videblas ĝi al ni.

4.) Ni homaj fieruloj,  
Mizeraĵoj ni pekuloj,  
Malmulton scias ni!  
Ni faras multajn aĵojn  
Kaj artajn elpensaĵojn,  
Sed vana estas tio ĉi.

5.) La Dian savon vidu  
Ni nur kaj ni ne fidu  
je vanta iluzi'!  
Ni malfieraĵoj iĝu,  
Ni ĝoju kaj piŝu,  
Infan-egalaj estu ni!

...

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Otto Bonte*

1. La luno jam leviĝis,  
Steletoj ekheliĝis,  
Ravante homojn nin;  
Silentas la arbaro  
Kaj super la kamparo  
Nebulo pala levas sin.

2. Ho, mondo la kvietaj,  
Kaj kiel ŝajnas eta  
Krepuska en kovril';  
Por ke vi en ĉambreto  
Samkiel infaneto  
Senzorge dormu en lulil'.

3. Rigardu nun la lunon,  
Vi vidas nur duonon,  
Sed tamen ronda ĝi.  
Ni ofte ion ridas,  
Ĉar ni ne klare vidas,  
Ke ĉie regas harmoni'.

4. ....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....

5. ....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....

...

<sup>3</sup>alia versio:

2.) Ah, kiel trankvileca  
La mondo kaj hejmeca  
Vespere estas ĝi!  
En tiu kalma paco  
Ekdormu vi pro laco,  
Forgesu la aflikton vi!

<sup>4</sup>S-ro Gießner unue tajpis:  
duona tamen nur.

6. ....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

6.) Finfine vi nin prenu  
 El tiu mond', ĉagrenu  
 Ni ne pro tio ĉi!  
 Kaj kiam vi nin prenos,  
 Ho faru, ke ni venos  
 En vian regnon, kara Di'!

6. ....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

7. Ĉe l'fino de la tago  
 kuŝigu vin sen plago,  
 silentas la anim'.  
 Ne punu nian faron,  
 sed nin kaj la najbaron  
 dormigu, Dio, nun sem tim'.

7.) Gefratoj, enlitiĝu,  
 Trankvile endormiĝu!  
 Noktiĝas ĉie ĉi;  
 Vin gardos nia Dio.  
 Li regas super ĉio.  
 Ĝis morgaŭ nun ripozu vi!

7. Ekkuŝu nun, gefratoj,  
 De bona Di' ŝirmataj  
 Kun tuta la homar'.  
 Kar-Dio ne nin punu,  
 Trankvilan dormon donu  
 Kaj al malsana la najbar'!

*Traduko de la Germana poemo  
 "Abendlied" de MATTHIAS CLAU-  
 DIUS (\*1740-08-15 - †1815-01-  
 21) en Esperanton de JOACHIM  
 GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-  
 11-25).*

*Arg-394-782 (2007-03-28  
 09:55:34)*

*Mi, Manfred Retzlaff, detajpis ti-  
 un tradukon de Joachim Gießner  
 el folio kun letero, kiun skribis al  
 mi en 1987-11-24 s-ro Joachim  
 Gießner. Li skribis en tiu letero, ke  
 la fakto, ke lia traduko de la unua  
 strofo estas tute la sama kiel en tiu  
 de Otto Bonte, estas hazardo kaj  
 ke li ne sciis antaŭe la tradukon de  
 Otto Bonte.*

*Traduko de la Germana poemo  
 "Abendlied" de MATTHIAS CLAU-  
 DIUS (\*1740-08-15 - †1815-01-  
 21) en Esperanton de MAN-  
 FRED RETZLAFF (\*1938-11-04)  
 en 1989-09-10.*

*MR-013-2 / Arg-394-777 (2007-  
 03-26 13:19:45)*

*Tiu ĉi traduko estas unue publi-  
 kigita en 1984 en "Esperanto ak-  
 tuell", numero 6/1984, la orga-  
 no de Germana Esperanto-Asocio,  
 sur la aldonaj "Flavaj paĝoj", paĝo  
 15. Enigis ka tekston de la traduko  
 la tiama redaktisto d-ro Dirk Will-  
 kommen. Mi, Manfred Retzlaff,  
 ŝanĝis en 2007-03-26 nur la du-  
 an strofon, kompare al la tek-  
 sto aperinta en "Esperanto aktuell  
 6/1984".*

*Traduko de la Germana poe-  
 mo "Abendlied" de MATTHI-  
 AS CLAUDIUS (\*1740-08-15 -  
 †1815-01-21) en Esperanton de  
 Otto Bonte.*

*Arg-394-779 (2007-03-26  
 22:31:58)*

*Tiu ĉi traduko estas publikigi-  
 ta en 1984 en "Esperanto ak-  
 tuell", la organo de Germana  
 Esperanto-Asocio, sur la aldonaj  
 "Flavaj paĝoj", sur paĝo 15 de  
 la numero 6/984. Mi, Manfred  
 Retzlaff, detajpis la tradukon el  
 tiu, en 2007-03-26. Enigis la tra-  
 dukon de Otto Bonte d-ro Dirk  
 Willkommen, la tiama redaktisto  
 de "Esperanto aktuell", .*